

Conrad Ferdinand Meyer,  
Paco sur tero  
*tradukita de Willy Nüesch*

La paštistoj en libero  
Lasis gregon, l' anĝelvorton  
Portis tra la basan pordon  
Al patrino kaj infan'.  
Plu kantadis en lontan'  
Ĉielgent' en spaco stela,  
Plu sonoris la ĉiela  
"Paco, paco sur la tero!"

Ekde tiu vort' anĝela  
Ho ve, kiom da kruela  
Faris la militkolero  
En kirias', sur rajdobel'!  
Ofte dum kristnaska fest'  
Ĥor' spirita kantis time,  
Insistpete, plendesprime:  
"Paco, paco ... sur la tero!"

Sed eternas kredregulo,  
Ke ne ĉiam la feblulo  
Igos pred' kaj rabkonkero  
De aroga murdogest':  
Iaspeca justo-est'  
En horor' kaj murdo rolas,  
Regno sin konstrui volas,  
Serĉas pacon sur la tero.

Iom post iom ĝi formos  
Sin, oficos sankte, forĝos  
Batalilojn sen danĝero,  
Flamoglavojn por la rajt'.  
Filioj kun fortoco-trajt',  
Reĝa gento ekburĝonos,  
Kies helaj tuboj sonos:  
Paco, paco sur la tero.

...

Conrad Ferdinand Meyer,  
Friede auf Erden

Da die Hirten ihre Herde  
Ließen und des Engels Worte  
Trugen durch die niedre Pforte  
Zu der Mutter und dem Kind,  
Fuhr das himmlische Gesind  
Fort im Sternenraum zu singen,  
Fuhr der Himmel fort zu klingen:  
"Friede, Friede auf der Erde!"

Seit die Engel so geraten,  
O wie viele blut'ge Taten  
Hat der Streit auf wildem Pferde,  
Der geharnischte, vollbracht!  
In wie mancher Heil'gen Nacht  
Sang der Chor der Geister zugend,  
Dringlich flehend, leis' verklagend:  
"Friede, Friede ... auf der Erde!"

Doch es ist ein ew'ger Glaube,  
Dass der Schwache nicht zum Raube  
Jeder frechen Mordgebärde  
Werde fallen allezeit:  
Etwas wie Gerechtigkeit  
Webt und wirkt in Mord und Grauen  
Und ein Reich will sich erbauen,  
Das den Frieden sucht der Erde.

Mählich wird es sich gestalten,  
Seines heil'gen Amtes walten,  
Waffen schmieden ohne Fährde,  
Flammenschwerter für dae Recht,  
Und ein königlich Geschlecht  
Wird erblühn mit starken Söhnen,  
Dessen helle Tuben dröhnen:  
Friede, Friede auf der Erde!

...

*Traduko de la Germana poemo “Friede auf Erden” de CONRAD FERDINAND MEYER (Konrado Ferdinand Majero, \*1825-10-11 – †1898-11-28) en Esperanton de WILLY NÜESCH (Etzelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, \*1927-05-09).*

*Arg-101-274 (2013-08-28 18:38:58)*

*La tradukinto, s-ro Willy Nüesch (Etzelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, tel. 0041-31-302 66 56), donis al mi, Manfred Retzlaff, en 2005-07-11 la skriban permeson pri la publikigo de tiu ĉi poemo en mia retejo “www.poezio.net”. La poemo enestas ankaŭ en la libro “Elektitaj poemoj de Conrad Ferdinand Meyer”, kiun eldonis s-ro Willy Nüesch. Ĝi estas aĉetebla ĉe li aŭ ĉe la libro-servo de UEA (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando).*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas CONRAD FERDINAND MEYER (Konrado Ferdinand Majero, \*1825-10-11 – †1898-11-28).*

*Arg-101-205 (2005-08-01 13:01:25)*